

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italiujo)

Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

Nº9 - Majo 1954

VIA INTERNACIA KONGRESO ESPERATAJ FERVOJISTOJ

De la 3a ĝis la 8a de la pasinta monato de majo realiĝis en nia Urbo (Verona) la Via Internacia Kongreso de la Esperantaj Fervojistoj, sub la Monora prezidanteco de Lia Ekcelenco la Ministro de la Transportoj, Hon. MATTARELLA.

Tiu manifestacio - kiu havis la plej vastan eĥon inter la italaj fervojistoj ĉeestintaj en multenombra grupo - kunvenigis en Verona'n proksimume sescent esperantistojn, el 14 eŭropaj nacioj. Krom, kompreneble, la densa grupo de la italaj, ĉeestis delegitoj de Aŭstrio, Belgio, Danio, Finlandio, Francio, Germanio, Anglio, Jugoslavio, Norvegio, Nederlando, Saarlando, Svedio, Svisio.

La sekretario de A.I.F.E., samideano Cesare CERONI, post longa, pacienca kaj multvalora prepara laboro estris pasie kaj kompetente atingante la plej kontentigajn sukceson kaj aprobon flanke de la kongresanoj.

Je la solena malfermo, kiu okazis je la 21 h. 30' de la 4a de majo en la ega salono "BOGGIAN" en "Castelvecchio" (mezepoka kastelode la "Scaligeri") kunvenis ankaŭ la plej altaj urbaj aŭtoritatuloj, i. a.: la Vicprefekto, Dokt. BUT; la Komunuma Asesoro Prof. E. ZAMBONI, reprezentanto de la Urbestro; la Provinca Asesoro, Adv. CAVALLA, reprezentanto de la Prezidanto de la Provinca Administracio Adv. BUFFATTI; Dokt. Ing. ANGELINI, estro de la fervoja "Compartimento" (fakego) de Verona; Dokt. C. FONTEBUONI, Direktoro de la Provinca Turisma Institucio, kaj Adv. E. SARTORI, Prezidanto de la Verona Esperanto-Asocio.

La impona salonego, estis plen plena pro la ĉeesto de ĉirkaŭ 600 kongresanoj.

Super la estrado, malantaŭ la tribuno, starigita por la parolantoj, rigardis en la salono granda ŝildo de la esperantaj fervojistoj; la verda kvinpinta stelo sur flugilhava rado. Ĉirkaŭe estis lokitaj drapiraĵoj, krom la italaj kaj aliaj flagoj de la diversaj naciaj asocioj reprezentataj.

Viva heĝo de rozkoloraj hortensioj kaj verdaj arbustoj dividis la estradon de la sekcio rezervita al la kongresano. Tiamaniero la bela salono "Boggian" estis feste ornamita.

Je la 21 h. 30', la laŭtigiloj komencis disaŭdigi la notojn de la universala esperantista himno, kiun ĉiuj ĉeestantoj kantis kune starantaj.

Parolis, unua, Kav. ZACCONI, kiu, esperantlingve, portis al la kongresanoj la koran bonvenigan saluton de la italaj esperantaj fervojistoj.

Nome de la Urbestro de Verona, forestinta pro oficaĵaj devoj, parolis poste, Asesoro Prof. ZAMBONI, kiu, per mallongaj diroj, esprimis al la ĉeestantoj la varme koran bonvenon de la urbo.

Kiel reprezentanto de la Ĝenerala Direktoro de la Italaj Ŝtatafervojoj kaj nome de la Verona'aj fervojistoj parolis Dokt. Ing. ANGELINI, fervoja estro de la "Com-

parlamento" de Verona. Jen liaj vortoj:

"Estis por mi tre dankeme ricevi, de Lia Moŝto la Direktoro de la Italaj Ŝtataj Fervojoj, la taskon reprezenti Lin okaze de tiu ĉi elstata kaj impona kunesto.

La kvanto de la kunvenintoj, kaj la granda nombro de la landoj kiujn ili reprezentas, donas la tuŝeblan signon de la penetro kaj de la disvastigo en ĉiujn sociajn tavolojn kaj inter la fervojistajn de la civilizitaj naciaj de la lingvo ESPERANTO.

Tiu de hodiaŭ estas manifestacio de frateco kaj de forto; manifestacio de frataj sentoj, ĉar la sameco de via helpa lingvo, faciligante la reciprokan konon, ebligas la komprenon de la problemoj kaj de la bezonoj de la diversaj popolrasaj grupoj kaj kunligas ilin en unu plenan interkonsenton de bonvolo kaj solidareco. Ĝi estas signo de forto tial ke ties akordoj, profundigantaj kaj disvastigantaj inter la popoloj, formas kunfandon de intereso kaj de sentoj kiuj plifortigas la eblecon de kunlaboro en la milito por la atingo de idealo de sereno, de justeco, de libereco.

Estas por tiu ĉi mirinda idealo, kiu travidiĝas en ne malproksima estonto, ke estos ebla la efektiviĝo de la celoj de altgrada humaneco al kiu strebas en la nuntempo la registaroj. Estas por tiu idealo ke mi bondeziras ĉiam pli grandan disvastigon de ESPERANTO, kiu kunhelpas por la atingo de pli altnivela bonvivo kaj progreso.

Persone, dum mi salutas ĉiujn gekongresanojn, mi varme bondeziras ke via laboro donu fruktodonajn rezultatojn."

Sekve, laŭvice, parolis esperante konata Prof. Dokt. Giorgio CANUTO, Rektoro de la Universitato el Parma kaj Prezidanto de F.E.I. (Itala Esperanto-Federacio). Li klare kaj taŭge tuŝis elegante kelkajn problemojn kaj varme bondeziris la kongreson; Dokt. Holland, oficiala reprezentanto de la Germanaj Fervojoj; Ing. FRISCHAUF, konsilanto de la Aŭstria Fervojoj; S-ro Höh, reprezentanto de la Saarlandaj Fervojoj; Ing. Hjalmar OLLSON, reprezentanto de la Svedaj Fervojoj; S-ro Kovacic, reprezentanto de la Sindikato Fervojistoj de Vieno; S-ro JRTENGREN, reprezentanto de la Svedaj Fervojistoj; S-ro Zinek, reprezentanto de la Aŭstria Esperantista Federacio; S-ro LABORIUS, reprezentanto de la Nederlandaj Fervojoj; S-ro HARTJEN por la Sindikato de la Germanaj fervojistoj; S-ro SEKERES, reprezentanto de la Jugoslava Fervojoj; S-ro WALTER, reprezentanto de la universala Esperanto-Asocio; Rag. RENI por la Itala Unigo de la Katolikaj Esperantistoj kaj nome de la Internacia Foiro de Verona; kaj ankoraŭ poste la reprezentantoj de la Fervojaj Esperantoj Federacioj de Aŭstrio, Belgio, Danio, Anglio kaj Finnlando. Ĉi tie ekparolis fraŭlino Germaine LEMONNIER, franca delegitino kaj reprezentanta Francan Esperanto-Asocio, kiu, same esperantlingvo, simpatie parolante pri la urbo Verona tiele esprimiĝis: "Ĉiu strato, ĉiu placo, ĉiu angulo de la urbo nin frapas per siaj artaj belaĵoj. Ni deva esti dankemaj al la itala popolo, kiu dum la jarcentoj sciis kolekti tiom da artobelaĵoj. Ni ankaŭ devas esti dankemaj al niaj veronaj samideanoj, kiuj nenion forlasis por akcepti nin kiel eble plej bone. Al ĉiuj ni deva eldiri nianjn plej varmajn dankesprimojn".

Sekvis ankoraŭ sur la podio de la parolantoj Dokt. Ing. FRISCHAUF, konsilanto de la Aŭstria Fervojoj kaj la reprezentanto de la Germana Esperanto Asocio. Tiu ĉi lasta, pli el ĉio, volis substreki la grandan praktikan utilecon de Esperanto, ekkriante: "Mi parolas nur unu lingvon, ni ne bezonas interpretistojn. Kial? Ĉar nia lingvo estas facile lernebla kaj ĉiuj ĉeestantoj en tiu ĉi salono sin reciproke ekzakte komprenas; kaj tio estas mirinda! Ni venas el malproksimaj landoj; estas ĉi tie oĉ finlandanoj, kiuj por atingi vian belan nacion kaj admiri la artaĵojn de viaj urboj devis vojaĝi kvar tagojn kaj kvar noktojn. Ni povas ĉi tie onterparoli sen embaraso, kaj interkompreniĝi ne studinte dekojn da jaroj en lernejoj. Nur kelkaj semajnoj, aŭ maksimume unu jaro sufiĉis al ni por lerni tiun ĉi mirindan lingvon: Esperanto. Iuj esprimas sin elemente alie pli altnivela; ni tamen ĉiukaze perfekte interkompreniĝas".

Post kora saluto de la Svisa reprezentante, por la vortoj de la nederlanda Sinjoro Stapel, prezidanto de I.F.E.F., kiu espriminte entuziasman dankon al la veronaj esperantistoj kaj precipe al S-ro Ceroni pro la bonega organiza laboro de li farita por

pretigi la kongreson, longe detale, klarigis la celojn kaj la intencojn de la fervoj istaj-esperantistoj, kaj, antaŭ ĉio, agi por ke la tuta povu iam libere kaj facile interparoli kor'al kore kiel fratoj, tiel ke la tre gravaj problemoj kiuj penigas la nuntempan homaron povu pli rapide solviĝi. Parolante pri specife pri la utileco de Esperanto rilate al la tutmonda fervojista klaso, Sinjoro Stappel asertis: "nia organizacio devas krei ion ne ankoraŭ ekzistantan kaj precize fervojan terminologian vortaron. Esperantista teknika terminaro ankoraŭ ne ekzistas kaj ni laboras por tiu giganta laboro, kiun oni ne devas subtaksi. Sendube ni, fine venkos ankaŭ tiun malfacilaĵojn.

La oratoro konkludis sian dirojn - tre aplaŭdita - salutante ĉiujn kunvenintojn kaj deklarante malfermitajn la laborojn de la VIIa internacia kongreso.

Lafatagon antaŭ la inaŭguracia ceremonio, la reprezentantoj de la diversaj naciaj asocioj kaniĝis por trakti la problemojn rilatajn al la gravaj laboroj traduki esperante la terminojn proprajn de ĉiuj eroj el kiuj konsistas la fervoja materialo, kaj la komuna organizado de la fervoja servo mem.

La laboroj daŭris en la ĝenerala kunveno de merkredo la 5a de majo, kiam estis traktataj la problemoj kiuj rilatis al la komuna teknika instruado en ĉiuj landoj, al la asistado kaj al la asekurado de la fervoja laboristaro.

Oni akordiĝis poste interesi ĉiujn fervojajn administraciojn:

- por pli faciligi kaj plivastigi internacian turismon, kaj la komercajn interŝanĝojn;
- por la kreo de informoficejoj en la stacidomoj, kie oni parolu esperante;
- oni traktis infine pri diversaj aliaj aferoj koncernaj al la propagando kaj al organizado por plifortigi kaj disvastigi la internacia kaj naciaj grupigoj.

Ĝaŭdon; la 6an, akazis opa vizito al la Garda Lago; granda motorŝipo transportis la kunularon al Gardone, kaj poste al Malcesine. En ĉi lasta ĉarma loko oni konsumis tagmanĝon, bonege servitan kaj ankoraŭ pli bone akvumitan..... per la bongusta vino de Bardolino, ankaŭ pro la afabla interesiĝo de la tiea urbestro: Generalo Pariani.

Post la fino de la supre diritaj laboroj, vendredon la 7an vespere, en la salono Boggian la kongresanoj estis amuzitaj per varieteca spektaklo, tre aplaŭdita, kiun, (ĉu necesa ĝin diri?) organizis fervojisto Sinjoro Fornaciari, kies kompanio tre bone ludis.

Sabaton, la 8an pli ol 400 kongresanoj per rapida ekskurso iris al Venecio la reĝino de la laguno, vizitante la "Palazzo Ducale" (luka Palaco), la S.Marko-bazilikon, kaj la insulojn Murano (fama por la artvitrajĉoj) kaj Burano (siavice fama por la artaj punktoj).

Superflue paroli pri la bonega impresio naskigita ĉu de nia urbo, ĉu de nia lago, en ĉiuj kongresanoj; impresio kiun oni povas sintezi en unu granda sento: la deziro reveni.

LISSENIOJ EN ESPERANTO

Junio 1954.a

- 413 merkredon la 2.an - "Parolataj leteroj" (magnetofona registrado) Parolado de S-ro B.S. Agren
- 414 vendredon la 4.an - Preŝdataj informaj dokumentoj pri linvo Esperanto (prezentado de libro ĵus publikigita de Itala Esper.Federacio)
- 415 merkredon la 9.an - Novaĵoj el Italujo
- 416 vendredon la 11an - Leterkesto kaj bibliografio
- 417 merkredon la 16an - Sankta Pio K.a kaj Esperanto
- 418 vendredon la 18an - Italaj belantaj urboj: TORINO
- 419 merkredon la 23an - Siciliaj kanzonoj
- 420 vendredon la 25an - Angelo Poliziano, okaze de la 5.a datreveno de la naskiĝtago (1454 - 1494)
- 421merkredon la 30an - "O-Tei"-japana legendo de Lafcadio Hearn, traduk.Hoiĉi Hiroŝi

Julio 1954, a

- 422 vendredon la 2. an - "Parolataj leteroj" (magnetofona registrado) Parolado de Prof. Ivo Lapenna pri UNESCO kaj Esperanto en Montevideo
423 merkredon la 7. an - Novaĵoj el Italujo
424 vendredon la 9. an - Marco Polo, okaze de la 7. a jarcenta datreveno de la naskiĝtago (1254-1323)
425 merkredon la 14. an - Gondoloj kaj kantoj sur la Venecia Laguno
426 vendredon la 16. an - "Madono" en la Dia Komedio de Dante A.
427 merkredon la 21. an - R. Schvartz - Satiro kaj humoro en Esperanto
428 vendredon la 23. an - Prezento de la programo de la 39. a Univ. Kongreso - Haarlem (31/7 - 7/8/54)
429 merkredon la 28. an - Eĥoj de la Florenca Muzika Majo
430 vendredon la 30. an - Italaj belartaj urboj: MILANO

=====

Prelegas: merkrede - S-ro Luigi Minnaja
" : vendrede - Prof. D. ro Vincenzo Musella

=====

La dissendoj okazas de h. 18,50 ĝis h. 19,10 (M.E.T.)
Stacioj je metroj 31,35 = Mc/s 9,52; metroj 49,92 = Mc/s 6,01

=====

Ni invitas la esperantistojn kunlabori en la rubriko "Parolataj leteroj". Bonvolu sendi plastikan bobenon kun enparolita paroladeto, registrita sur magnetofona paper-strio (Sound Recording Tape) 1/4" x 1200 ft. rapideco 7½ inc. = 19 milimetroj/sekundo. La bobeno estos resendata je niaj poŝtelspezoj.

La enhavo estu en perfekta Esperanto kaj la registrado teknike bonkvalita. La temoj plej variaj sed nur je internacia intereso (escepte la politikaj) nome: scienco-arto-turismo-folkloro literaturo-recenzoj-malfermo de Kongresoj-gravaj okazaĵoj en Esperantujo-komparaj lingvaj studoj-prelegoj en somera universitato ktp.ktp. Radio Roma disponigas siajn mikrofonojn al tutmonda esperantistaro. Kunlaborado senpaga. Jen via tribunolo!

ARTICOLI SULL'ESPERANTO SU RIVISTE

Nella rivista settimanale "GIOVANI", dedicata alla gioventù studentesca; che si pubblica a Torino (P/za M. Ausiliatrice 9), è apparso un articolo "PER INTENCIONI AL DI LA' DEI CONFINI - L'ESPERANTO: LINGUA DEL DOMANI" dovuto al Prof. G. CANUTO Rettore dell'Università di Parma e Presidente della Federazione Esperantista Italiana. Con il prossimo numero che uscirà il 23 Giugno 1954 (primo numero delle vacanze) tale rivista ospiterà un corso di lingua Esperanto, diretto dal Prof. R. BASCHERA. Il nostro caloroso saluto e ringraziamento alla rivista "GIOVANI"

ESAMI DI ESPERANTO

Il giorno 16 Maggio 1954 hanno avuto inizio a Bologna gli esami per il Certificato di Studio e per il Certificato Superiore. Hanno ricevuto il Certificato di Studio 2 alunni ed il certificato Superiore 13 alunni fra i quali 5 dei Corsi tenutasi a Forlì. Fra i migliori sono stati premiati 5 candidati con medaglie e premi in danaro.

In Ottobre si terranno altri esami di Esperanto per i Certificati dei primi 3 gradi.